# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-17 n-ro 358

# La Unuiĝintaj Nacioj kritikas la kunlaboron inter Libio kaj Eŭropa Unio



Tago de la Verkisto en Prizono 2017

Simpla kaj malmultekosta maniero diagnozi haŭtkanceron

AU urĝas Zimbabvon laŭleĝe trakti politikan krizon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

La Unuiĝintaj Nacioj kritikas la kunlaboron inter Libio kaj Eŭropa Unio
*«La kunlaboro inter Eŭropa Unio kaj Libio por haltigi alvenon de migrantoj estas malhumana» p. 03*

Ĉefo de UN renkontiĝis kun speciala sendito de Ĉinio pri klimatŝanĝiĝo
*Kunlaboro inter Ĉinio kaj la UN p. 04*

AU urĝas Zimbabvon laŭleĝe trakti politikan krizon
*Trakti la nunan politikan senelirejon laŭ la konstitucio de la lando p. 04*

Tago de la Verkisto en Prizono 2017
*Honduraso, Vjetnamo, Ekvatora Gvineo, Sirio kaj Turkio p. 05*

Nombro de mortintoj pro latertremo kreskis ĝis 474 en Irano
*9 388 aliaj estis vunditaj p. 05*

La nesufiĉo de butero en Franclando
*Plej intensa krizo pri manko de butero ekde la dua mondmilito p. 06*

Simpla kaj malmultekosta maniero diagnozi haŭtkanceron
*La disponaĵo kreas varmecmapojn por trovi malnormalaĵojn en haŭto p. 07*

"Tion mi jam ĉiam diris!"
*Homoj vere ne konscias pri siaj malnovaj opinioj, se ili ŝanĝis tiujn p. 08*

Hodiaŭe
*Joost van DEN VONDEL; Mihály CSOKONAI VITÉZ; Salomėja NĖRIS; kaj Japanio p. 09*

# La Unuiĝintaj Nacioj kritikas la kunlaboron inter Libio kaj Eŭropa Unio

«La kunlaboro inter Eŭropa Unio kaj Libio por haltigi alvenon de migrantoj estas malhumana», senafekte deklaris la Alta-komisaro pri la homaj rajtoj de UN, mardon 14an de novembro. Revene de misio en Libio, la observantoj de UN konstatis, ke la situacio de la migrantoj en la lando difektiĝas. Tiuj delokitoj suferas pro «neimageblaj hororoj» memorigas Zeid Ra'ad Al Hussein, kiu kondamnas la helpon provizitan de EU al la libiaj aŭtoritatoj.



«La suferoj de la migrantoj en Libio estas krimego kontraŭ la homaro». Ĉu la mesaĝo de Zeid Ra'ad Al Hussein estos aŭdata?

Miloj da viroj, virinoj kaj infanoj amasigitaj unuj sur la aliaj en hangaroj, malgrasiĝintaj, traŭmatizitaj, senigitaj de sia digneco, batataj per elektra bastono; virinoj seksperfortitaj fare jen de homŝakristoj, jen de provosoj de la oficialaj detencentroj: jen kion raportas la observantoj de UN, kiuj vizitis kvar centrojn de la libia departemento de lukto kontraŭ la kontraŭleĝaj migradoj. En tiuj centroj, la nombro de personoj preskaŭ triobliĝis inter septembro kaj novembro 2017.

Bruselo konodamnas tiujn detenkondiĉojn kaj volas ties plibonigon, kun centroj konformaj kun la internaciaj normoj. Tio ne solvos la problemon, respondas la Alta-komisaro de UN, kiu kontestas la helpon provizitan favore al la libiaj marbordaj gardistoj, por interkapti la migrantojn en la maro.

Komence de novembro, dum sukuroperaco de NRO, libia patrolŝipo, malobservante la instrukciojn de la itala mararmeo, kaŭzis la morton de kvin migrantoj, en abrupta manovro.

Ĉi-mardon [14 nov 2017], la Libia mararmeo denove postulis helpon de la Eŭropanoj por renovigi la ŝiparon de ĝiaj marbordaj gardistoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Ĉefo de UN renkontiĝis kun speciala sendito de Ĉinio pri klimatŝanĝiĝo

Merkrede [15 nov 2017] en la germana urbo Bonno, ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj António GUTERRES renkontiĝis kun XIE Zhenhua, estro de la ĉina degelacio por la 23a Konferenco de Partioj Aliĝintaj al la Kadra Konvencio de la UN pri Klimatŝanĝiĝo kaj speciala sendito de Ĉinio pri aferoj de klimatŝanĝiĝo. Ili interŝanĝis opiniojn pri ĉi-rilata kunlaboro inter Ĉinio kaj la UN kaj la tutmonda agado kontraŭ klimatŝanĝiĝo.




GUTERRES diris, ke en la pasintaj jaroj Ĉinio montris gravan gvidadon en ekonomia disvolvado, medio kaj klimato kaj estis grava partnero de la UN en multflanka procezo. Li aldonis, ke Ĉinio ludas tre gravan rolon en antaŭenigo de la multflanka procezo de klimatŝanĝiĝo.

XIE diris, ke la trakatdo de klimatŝanĝiĝo kongruas kun la klopodoj disvolvi ekonomion, protekti ekomedion kaj la sanon de la popolo, pliigi laborpostenojn, kaj akceli transformiĝon de produktado kaj vivmaniero. Li esperis, ke la UN konsciigos al ĉiuj landoj la sinergion de la traktado de klimatŝanĝiĝo kaj la atingo de la Celoj de daŭripova disvolvado de 2030 kaj puŝos la tutan mondon realigi verdan, malaltkarbonan kaj daŭripovan disvolviĝon kaj efike efektivigi la Parizan Interkonsenton.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# AU urĝas Zimbabvon laŭleĝe trakti politikan krizon

La Afrika Unio alvokis koncernatojn en Zimbabvo trakti la nunan politikan senelirejon laŭ la konstitucio de la lando.



Moussa Faki MAHAMAT, prezidanto de la Komisiono de la Afrika Unio, diris merkrede [15 nov 2017] en deklaro, ke la AU atenteme observas la situacion en Zimbabvo, post kiam la armeo kaptis potencon de la registaro merkrede frumatene.

MAHAMAT diris, ke li urĝas ĉiujn koncernatajn partiojn trakti la nunan situacion laŭ la Konstitucio de Zimbabvo kaj la rilataj instrumentoj de la Afrika Unio, inkluzive de la Afrika Ĉarto pri Demokratio, Elektoj kaj Regado. Li emfazis, ke la krizo devas esti solvita en la maniero, kiu akcelas demokration, homajn rajtojn kaj sociekonomian disvolvadon de la lando. Li ankaŭ esprimis la promeson de la AU labori kun la Sud-Afrika Disvolva Komunumo por certigi pacan solvadon de la krizo.

Sud-afrika prezidento Jacob ZUMA, en nomo de la Sud-Afrika Disvolva Komunumo, publikigis deklaron, esprimante gravan maltrankvilon de la komunumo pri la politika situacio en Zimbabvo. Li urĝis la zimbabvan registaron kaj la armeon solvi la politikan krizon amike.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Tago de la Verkisto en Prizono 2017

Morgaŭ PEN Internacia celebros la Tagon de la Verkisto en Prizono. Por 2017 estas en la fokuso la kazoj de Cesario Alejandro Félix Padilla Figueroa en Honduraso, Nguyen Ngoc Nhu Quynh en Vjetnamo, Ramón Esono Ebalé en Ekvatora Gvineo, Razan Zaitouneh en Sirio, Zehra Doğan en Turkio.



Daŭre observata estas ankaŭ la kazo de verkistino Dareen Tatour, en hejma aresto en Nazareto. Ŝin renkontis lastatempe Jennifer Clement, PEN-prezidantino.

Inter la PEN-verkistoj kiuj aktivas por la enprizonigitoj meritas apartan mencion Homero Aridjis, Neil Gaiman, Kamila Shamsie, Madeleine Thien kaj Ai Weiwei.

Esperanta PEN-Centro okupiĝas pri kazoj de enprizonigo pro la uzo de malpermesata lingvo, sendepende de la enhavo. Ni memoru ke esperanto mem situas de tempo al tempo en listo de malpermesataj lingvoj: la plej gravaj dum la unua mondmilito (en kelkaj landoj de la Entento, specife Francio kaj Italio) kaj dum la dua (en landoj sub la influo de la Tria Regno; tamen Radio Romo elsendis militan propragandon en nia lingvo ĝis 1942).

En la PEN-Komitato por verkistoj en prizono nian centron reprezentas d-ino Chiara Macconi.

HeKo 664 7-B, 14 nov 17

---

## Nombro de mortintoj pro latertremo kreskis ĝis 474 en Irano

La Irana novaĵ-agentejo *Rasnim* raportis merkrede [15 nov 2017], ke la nombro de mortintoj pro la fortega tertremo en la okcidento de Irano kreskis ĝis 474 merkrede, tri tagojn post la katastrofo.



La raporto diris, ke la savteamoj ankoraŭ laboras en la regionoj trafitaj de tertremo, kaj la plej freŝa nombro montris, ke 474 homoj mortis kaj 9 388 aliaj estis vunditaj.

La epicentro de la dimanĉa tertremo mezurita je la riktera grado 7,3, troviĝis je proksimume 32 kilometroj sude de la urbo *Halabja* en la fora montara regiono de orienta Irako, je ĉirkaŭ 200 kilometroj nordoriente de Bagdado kaj 400 kilometroj okcidente de Tehrano.

Marde dum sia vizito al la regionoj trafitaj de la tertremo, Irana prezidento Hassan Rouhani diris, ke la tertremo detruis 11 000 kamparajn domojn kaj 4 500 urbajn loĝejojn, kaj ke 30 000 domoj devas esti rekonstruitaj.

Yu
Ĉina Radio Internacia



# La nesufiĉo de butero en Franclando

Lastatempe tiuj kiuj provas aĉeti buteron en Franclando ofte trovas malplenajn fridbretarojn kaj pardonpetojn fare de vendejestroj. Laŭ artikoloj en la gazetaro, tiu lando spertas la plej intensan krizon pri manko de butero ekde la dua mondmilito. Per kradvorto *#beurregate* la uzantoj de sociaj retejoj ŝercadas pri la alta prezo pagataj kontraŭ pakaĵeto da butero.

Tiu nutraĵo estas fundamenta ingredienco kadre de la franca kuirarto. Kvarono de la pezo de korna bulko, ekzemple, rezultas el uzo de butero je ties pretigado.

Francoj estas la plej grandaj konsumantoj de butero, sed ili ankaŭ estas grandaj produktantoj. Nu, kial ĝi malaperis el la bretaroj? Jen kelkaj eblaj kialoj: 1-e) Estingo en 2015 de la kvantsistemo por laktoproduktantoj fare de Eŭropa Unio (por komerca konkurado); 2-e) La ĉinoj malkovris la kornan bulkon (plialtigo je tutmonda konsumado); 3-e) Okcidente pli kaj pli da laktaĵoj ol sukeraĵoj estas konsumataj (sanecocele).

Sed laŭ Emmanuelle Auriole, de la lernejo pri ekonomiko “*Toulouse School of Economics*”, la francoj spertas tiun problemon pro difekto je sia interna merkato en tiu sektoro, kiu estas regata de malmultaj grandaj retoj de supervendejoj, kiuj altrudas al la produktantoj la difinon de prezoj nur unufoje jare. En Germanlando, ekzemple, la prezoj de butero pagataj al produktantoj ĉi-jare ĝis aŭgusto jam plialtiĝis je 72%, dume en Franclando ĝi estis 6% samperiode. Tial oni ne miras, ke francaj produktantoj preferas eksportadi buteron anstataŭ prizorgi la lokan bezonon.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Simpla kaj malmultekosta maniero diagnozi haŭtkanceron

"*sKan*" estas malmultekosta disponaĵo, kiu povas malkovri kanceron de haŭto fruetape. La disponaĵo kreas varmecmapojn por trovi malnormalaĵojn en haŭto nomatajn ankaŭ kiel melanomoj, kiuj estas plejeble sukcese kuracataj kondiĉe de frua malkovro. Haŭtkancero estas la plej vasta formo de kancero tutmonde, kiun oni frontas en unu triono da kazoj kaj ĝi kaŭzas dekmilojn da mortoj ĉiujare. *sKan* gajnis ĉi-jare la internacian premion de Ĝejms DAJSON, kio donos aldonajn subvenciojn kaj atenton, kiuj povus helpi savi sennombrajn vivojn.



Por atingi ĉi-celon la disponaĵo *sKan* uzas relative pli aktivan metabolon de kanceraj ĉeloj. Post periodo de malvarmigo la haŭto damaĝita de kanceraj ĉeloj revarmiĝos pli rapide pro tiu ĉi fakto, ol la sanaj ĉeloj. sKan uzas malmultekostajn kaj akuratajn temperaturmezurilojn por trovi rapide revarmiĝantajn partojn de la haŭto, lumigante per lumĵetileto potenciale kancerajn ĉelojn. Ĉi-rezultoj poste estas montrataj sur varmomapo, kiu povas esti uzata de medicina spertulo por difini, ĉu la kuracato bezonas aldonan helpon. Malfrua malkovro povas signifi diferencon inter vivo kaj morto por homoj, suferantaj pro haŭtkancero; la pritaksita pluvivkapablo de tiaj ĉi kuracatoj, kies malsano estis frue malkovrita, estas 98 procentoj.

"Uzi vaste atingeblajn kaj malmultekostajn komponantojn la *sKan* ebligas facile trovi melanomojn al multaj homoj", diras Ĝejms DAJSON, la Britia inventisto kaj industria dezajnisto. "Tio ĉi estas tre saĝa disponaĵo kun eblo savi vivojn en la tuta mondo. Pro tio mi elektis ĝin ĉi-jare kiel internacian venkinton." Aldone al la honoro esti gajninto de la premio, la teamo de *sKan* ricevos 40 000 dolarojn, kiujn ili planas uzi por kongrui al la normoj de la Usona Administracio pri manĝaĵoj kaj kuraciloj. "Ni vere estas inspiritaj kaj konsciigitaj pro ricevo de tia ĉi grava eblo", diras teamo de sKan okaze de sia venko.

Kirill NOVIĈENKO
Interalie

# "Tion mi jam ĉiam diris!"

Kiel bele kaj edife estas ĉiam pravi kaj havi jam dekomence la ĝustan opinion. Por ĉiam denove travivi tiun dolĉan senton homoj kondutas koncerne siajn opiniojn kiel maniuloj: Ili manipulas sin kaj sian mempercepton por ĉiam resti pravaj laŭ la sento kaj por konfirmi siajn sintenojn. Se ekzemple iu - kio okazas sufiĉe malofte - ŝanĝas sian opinion pri temo, tiam la psiko prizorgas plue ignori tiun procezon. Anstataŭ diri ke oni antaŭe konsideris iun aferon alie, nun la pravemulo trumpetas el la homo: "Tion mi jam ĉiam diris!"




Du usonaj psikologoj montras en aktuala studaĵo ke homoj vere ne konscias pri siaj malnovaj opinioj, se ili ŝanĝis tiujn. La esploristoj prezentis al testantoj tekstojn kiuj argumentis aŭ por aŭ kontraŭ la efikeco de korpaj punoj kiel instrumento de edukado. Antaŭe la psikologoj estis demandintaj la partoprenantojn pri iliaj sintenoj. La eseoj mezureble influis la sintenojn de la testantoj: Kiu ekzemple antaŭe estis espriminta la sintenon, ke korpa puno plibonigas la disciplinon de junulo, tiu deviis de sia sinteno, se li estis konfrontita per kontraŭargumentoj kaj inverse.

La morala dimensio de la demando ĉu gepatroj rajtas bati infanojn, ne estis diskutata. Sekve la psikologoj demandis la partoprenantojn kiun opinion ili havis antaŭ la legado de la teksto. Ĉe tio montriĝis skemo: plej multaj el ili asertis ke ili havis la saman sintenon - tute sendepende kiel ili estis ŝanĝintaj sian opinion per la konfronto kun kontraŭargumentoj.

Por defendi la partoprenintojn de tiuj eksperimentoj kaj entute de ĉiuj kronikaj pravemuloj de tiu ĉi mondo estu dirate: Ne eniras tutsimple en la homan menson se ŝanĝiĝis la opinio. Temas malofte pri konscia mensogo, se oni adaptas retroefike siajn sintenojn. La usonaj psikologoj eksplikas tion per la facileco kiel aferoj estas memoreblaj. Ju malpli da peno kaŭzas pensoprocezo, des pli facile tiu perceptas ĝin kiel veran el kies kapo ĝi fontas. Kio senpene mense aperas, tio sentiĝas kiel bona kaj ĝusta. Je la demando kiun opinion oni havis pli frue, kvazaŭ aŭtomate la aktuala sinteno saltas el la cerbo - kaj tio efikas kvazaŭ kiel pruvo ke oni jam ĉiam havis tiun opinion.

Tio sonas strange kaj estas malfacile akceptebla, ĉar preskaŭ ĉiu kredas ke oni disponas pri almenaŭ iu baza mempritakso. Kaj kio validas por pasintaj opinioj, tio validas ankaŭ por estontaj. Homoj laŭ tio kredas ke iliaj preferoj, iliaj sintenoj kaj ankaŭ la facetoj de ilia personeco estonte ne plu ŝanĝiĝos. Tio validas same por junaj plenkreskuloj kiel ankaŭ por altaĝuloj.

Esperanta Retradio



# Joost van den Vondel

**Joost van den Vondel (17-a de novembro 1587 en Köln – 5-a de februaro 1679 Amsterdamo), estas Nederlanda poeto kaj dramisto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

---

# Mihály Csokonai Vitéz



**Csokonai Vitéz Mihály [ĈOkonai VIte:z MIha:j] (naskiĝis la 17-an de novembro, 1773, mortis la 28-an de januaro, 1805) estis la plej granda lirikisto post Bálint Balassi.**

**En Esperanto aperis: *Al la espero; La vespero; La feliĉo; Al rozburĝono; Al la sonĝo; parto de La senmorteco de la animo*.**

**Vikipedio**

---



# Salomėja Nėris

**Salomėja Nėris (ĝis 1940 Salomėja Neris; vera nomo: Salomėja Bačinskaitė-Bučienė; naskiĝo la 17-an de novembro 1904 – morto la 7-an de julio 1945) estas unu el la plej bone konataj poetinoj de Litovio.**

**Vikipedio**

---



# Bildo de la tago

**La *Kinkaku-ji*, aŭ templo de la Ora Pavilono, Kioto, Japanio.**

**Vikipedio**